

## **Protokolo de la komitatkunsido de ILEI en Oostende (BE)**

**1-a sesio: Dimanĉo 19.07.2015, 10:00 – 12:30 horo**

### **01 Malfermo**

Prezidanto Mireille GROSJEAN bonvenigas la komitatanojn je la 10:04.

#### **Anstataŭado**

Aŭstralio : Jennifer BISHOP donas sian voĉon al Roland ERIKSSON

Belgio : Marc CUFFEZ donas sian voĉon al Kristin TYTGAT

Finnlando : Paula NIINIKOPI donas sian voĉon al Sylvia HÄMÄLÄINEN

Francio : Jacqueline POUX donas sian voĉon al Monique ARNAUD

Francio : Michel DÉCHY donas sian voĉon al Monique ARNAUD

Germanio : Karin KLOSE donas sian voĉon al Zsofia KÓRÓDY

Germanio : Rudolf FISCHER donas sian voĉon al Zsofia KÓRÓDY

Germanio : Wolfgang BOHR donas sian voĉon al Zsofia KÓRÓDY

Svislando : Jean-Thierry VON BÜREN donas sian voĉon al Mireille GROSJEAN

Usono : Lucille HARMON donas sian voĉon al Ronald GLOSSOP

### **02 Decido pri nombro de voĉoj**

Zsofia KÓRÓDY ricevis du delegojn kaj havas sian voĉon. Aperas la demando, kiu estu la maksimuma nombro de voĉoj. GROSJEAN proponas, ke la maksimuma nombro estu 3. La propono estas akceptita per 28 aproboj kaj 1 sindeteno.

### **03 Informo pri kvorumo**

Ĉeestas 16 komitatanoj, Mireille kontrolas la paperojn, per kiuj la ne-ĉeestantaj komitatanoj transdonas sian voĉon. Konsekvence estas 29 voĉoj entute.

ILEI havas 64 komitatanojn. Por atingi kvorumon necesas esti pli ol triono, do kvorumo estas atingita.

### **04 Definitivigo de la tagordo**

Robert MOERBEEK proponas aldoni la punkton 26 "diversaĵoj"

La tagorda propono estas akceptita unuanime.

### **05 Elekto de protokolantoj.**

GROSJEAN klarigas pri la reguloj rilate al protokolantoj, ne nepre devas esti du personoj.

Uriel GURDIÁN el la publiko estas akceptita kiel protokolanto.

### **05.1 Kontrolantoj de la protokolo**

MOERBEEK kaj KÓRÓDY pretas kontroli la protokolon. Unuanime akceptita.

### **05.2 Elekto de Voĉ-nombranto**

GROSJEAN proponas, ke Geomar MARTÍNEZ estu la nombranto, la propono estas akceptita.

### **06. Akcepto de protokolo en Montevideo**

Venis demando, ĉu oni povas koni la tiaman voĉdon-rezulton. Jes, la informo troviĝas en la retpaĝo ilei.info. GROSJEAN trovas ĝin kaj legas ĝin.

La protokolo estas akceptita per 28 aproboj kaj 1 sindeteno.

### **07. Komitataj decidoj en Montevideo**

#### **07.1 Kontakto kun Unesko**

GROSJEAN: Oni diris, ke por esti Neregistara Organizo ĉe Unesko oni devas havi sidejon, telefonnumeron, dungitojn ktp. Tamen GROSJEAN trovis, ke ne estas tiuj postuloj en la regularo de Unesko. En Unesko jam estas UEA kaj ne estas obstaklo, por ke Esperanto estu dufoje reprezentata en Unesko. GROSJEAN vojaĝos al Parizo por pli bone informiĝi pri la afero.

#### **07.2 Ekzamenoj**

Moerbeek: NGGE proponis malsevere trakti dubajn punktojn ĉe ekzameno, t.e. gramatiko, vortaro. Li proponas, ke la komitato konsilu pri la afero.

GROSJEAN: La afero pri ekzamenoj estas en evoluo.

Ŝi proponas elekton de Internacia Ekzamena Komisiono.

Ŝi proponas 7 personojn (Karine ARAKELJAN, Monika MOLNAR, HAN Zuwu, Giridhar RAO, Jérémie SABIYUMVA, Christophe CHAZAREIN, Mireille GROSJEAN)

La proponitaj membroj de la Internacia Ekzamena Komisiono estas elektitaj per 29 aproboj. Tio koncernas la deĵorperiodon 2015-2018. Tiu konsisto devas esti aprobata de la Komitato de UEA.

#### **07.3 Voĉdono pri la voĉdon-sistemo de GROSJEAN**

GROSJEAN okaze de voĉdono demandas unue: kiu kontraŭas. Radojica PETROVIĆ atentigas, ke en voĉdonoj la kutimo estas demandi unue, kiuj aprobas kaj poste kiuj kontraŭas.

La komitato decidas per 15 aproboj, 1 sindeteno kaj 12 kontraŭaj voĉoj, ke GROSJEAN ŝanĝu sian sistemon al la plej kutima.

### **08. Dumkonferenca Komisiono**

MOERBEEK proponas, ke estu komisiono por verki konferencan rezolucion prepare al la 100-a UK.

GROSJEAN: La Unesko-Jaro atingis la finon, ĉu la rezolucio temos pri la tuta pasinta jaro aŭ pri la nuna konferenco?

Kreiĝis komisiono por verki rezolucion, pensante pri la temo de la konferenco; en la komisiono membras:

S-ro HUANG Yinbao (Trezoro) – Ĉinio

S-ro Ronald GLOSSOP – Usono

S-ro Robert MOERBEEK – Nederlando

S-ro Mihai TRIFOI – Rumanio

S-ino Mireille GROSJEAN – Svislando

S-ino SUSILOWATI – Indonezio

La komisiono havas provizoran prezidanton, s-ron MOERBEEK.

### **09. Propono por honoraj membroj**

Al la estraro de ILEI venis raporto tre riĉa pri la agado de Zsófia KÓRÓDY. GROSJEAN lanĉis la proponon, ke Zsófia fariĝu Honora Membro. GROSJEAN montras leterojn de la sekcioj en Usono, Svislando, Danlando, Ĉinio, Japanio, Francio, Hungario, Aŭstralio, Francio, Hungario kaj Finnlando; tiuj leteroj petas, ke Kóródy fariĝu Honora Membro de ILEI. La minimumo por valida propono de Honora Membro estas subteno de 3 sekcioj.

Voĉdonado okazas kaj S-ino KÓRÓDY estas elektita Honora Membro de ILEI per 28 aproboj kaj 1 sindeteno.

### **10. Informo pri eventualaj aliĝoj de novaj sekcioj.**

Estas 5 landoj, kiuj rajtus kandidatiĝi por havi ILEI-sekcion, ĉar ili jam havas 5 aŭ pli da membroj, sed ili mem ne komencis la laboron por la aliĝo. La landoj estas: Armenio, Britio, Slovakio, Urugvajo, Indonezio.

Estas traktita la temo pri sekcioj en teritorioj; ekzemplo estas, ke ekzistas teritorio en Katalunio kun ILEI-sekcio kaj nur poste naskiĝis sekcio en Hispanio. Komitatanoj opinias, ke estas danĝera paŝo akcepti teritoriojn, ĉar poste venos pliaj kaj ILEI devas esti gvidata je neŭtrala bazo.

MOERBEEK proponas la terminon: “ceteraj teritorioj”. Diskuto vekiĝas kaj konkludiĝas, ke tio estas tasko de la “regulara komisiono”, kiu devus kontroli la nunan regularon.

NOTO: alvenis 2 novaj komitatanoj, nun la sumo de voĉoj estas 31.

### **11. Ĉu ni diskutu pri la estraro?**

GROSJEAN: mi raportas detale ĉiun 3-an monaton.

Pri la membro-listo kaj membro prizorgado la respondeco iris al Sebastian CYPRYCH el Pollando, kiu fariĝis komisiito por la menciita tasko.

William HARRIS: Pri la financa raporto, deficito estis, tamen malgranda je proksimume €1000 kaj antaŭ du jaroj la buĝeto montris deficiton, kvankam ne vere estis.

Du fondusoj aldoniĝis, unu por subteni la instruadon en Nov-Zelando kaj la alia por Instru-kapablago en Afriko, tio estas pozitiva punkto, ĉar tiuj fondusoj fidus je ILEI.

Kreiĝis premio "La Torre". La anonco okazis dum la malfermo de la Konferenco kaj la disdono okazos dum la UK.

## **12. Jarraporto**

GROSJEAN: Estas du flankoj en la vivo de ILEI; unue la baza mastrumado, tio estas baza prizorgado; tio plene okupis ILEI-n pasintjare. Due projektoj kaj iniciatoj; ILEI nenion eldonis nek estis novaj iniciatoj, tamen okazis la Tria Tutmonda Kolokvo.

Tre bone laboris 6 personoj en la estraro.

La 2 retejoj ilei.info kaj ilei-mondo.info ne estas kontentigaj, ili havas siajn proprajn problemojn.

Ĉu ILEI havas la forton havi kaj prizorgi du retejojn?

Stefan MACGILL: Necesas havi bonan gvidilon por mastrumi la paĝaron.

PETROVIĆ: Necesas laborgrupo el 3-5 personoj por fake studi kaj trakti la aferon

La jarraporto estis aprobita, 27 jes. (forestis 4 komitatanoj).

## **13. Financa Raporto**

La raporto estas aprobita, 29 jes, 1 sindeteno. (forestis 1 komitatano)

## **14. Senŝarĝigo de la estraro**

Okazas la voĉdono por malŝarĝigo de la estraro. Tio estas aprobita unuanime per 31 voĉoj.

## **15. Elekto de nova estraro**

La elekta komisiono ĉeestas: S-ino Aurora BUTE , S-ino Monique ARNAUD kaj S-ino Synnöve MYNTTINEN.

**16. Raporto pri la laboroj de la elektokomisiono tra lastaj monatoj.**

## **17. Decido pri nombro de estraranoj**

BUTE legas la punktojn 6.1.6, 7.2.2 kaj 7.2.1 de la statuto, kaj proponas, ke unue estu voĉdono pri la nombro de estraranoj kaj poste la elekto.

Okazas debato pri la nombro de la estraranoj; TRIFOI proponas, ke estu 9 estraranoj, PETROVIĆ proponas 7 same kiel Jungkee LEE, la ideon subtenas GROSJEAN. ARNAUD proponas 9.

La rezultoj de la voĉdono estas 15 voĉoj por havi 7 estraranojn, 12 voĉoj por havi 9, kaj 4 sindetenoj. La estraro konsistos el 7 personoj.

**Fermo de la unua sesio okazis je la 12:32 horo.**

**2-a sesio: Lundo 20.07.2015, 14:00 – 18:00 horo**

GROSJEAN salutas kaj transdonas la parolon al Aurora BUTE .

BUTE kontrolas la kvorumon, estas 34 voĉoj.

BUTE legas la raporton de la elekta komisiono.

Rekandidatiĝas Mireille GROSJEAN, Xiaofeng GONG, Radojica PETROVIĆ kaj William HARRIS.

La komisiono demandis 14 personojn pri eventuala kandidatiĝo kaj venis 5 respondoj, do estas 9 kandidatoj por okupi la 7 lokojn en la nova estraro

### **18. Elekto de prezidanto**

Estas unu kandidato: S-ino Mireille GROSJEAN.

BUTE legas la sinprezenton de GROSJEAN

MYNTTINEN kaj KOVÁTS esprimas sian subtenon al GROSJEAN

Mireille GROSJEAN estas elektita prezidanto de ILEI kun 33 voĉoj kaj 1 sindeteno.

### **19. Elekto de sekretario**

Estas unu kandidato: S-ro Emile Malanda

Venas duboj en la komitato pri la regula komunikado kun li, ĉar li vivas en Afriko.

GROSJEAN kaj BUTE klarigas, ke ne estas problemoj kaj li spertas pri tio.

BUTE legas la sinprezenton de Malanda.

Glossop atentigas, ke li estos la unua afrika estrarano de ILEI.

Lee petas komentojn al GROSJEAN pri Malanda.

GROSJEAN: Mi ne havas problemojn kun li, li estas tre taŭga.

MACGILL: Malanda intervenas regule en la listo de Afrika Komisiono tre milde kaj serioze.

Malanda estis elektita nova sekretario kun 32 voĉoj kaj 2 sindetenoj.

### **20. Elekto de estrarano pri financoj**

S-ro William HARRIS estas la nura kandidato.

BUTE legas la sinprezenton de HARRIS.

Moerbeek atentigas, ke la nomoj de la kandidatoj devas esti videblaj por la komitato. Oni skribis la nomojn sur granda papero ĉe la muro de la ĉambro.

GROSJEAN komentas, ke ŝi tre ŝatas la kunlaboron kun HARRIS.

HARRIS estis elektita estrarano pri financoj kun 33 voĉoj kaj 1 sindeteno.

### **21. Voĉdonado por kandidatoj servintaj tra du mandatoj**

Radojica PETROVIĆ jam servis dum du mandatoj.

BUTE legas sinprezenton de PETROVIĆ kaj la leteron pri kial li deziras rekandidatiĝi.

GROSJEAN: Mi ne povas imagi la estraron sen Radojica.

BUTE klarigas, ke necesas 2 trionoj de la voĉoj.

Voĉdono okazas per levo de manoj kaj PETROVIĆ rajtas kandidatiĝi, kun 32 voĉoj kaj 1 sindeteno (la sumo estas 33 ĉar PETROVIĆ mem devis forlasi la salonon)

#### **21.1 Elekto de ceteraj estraranoj**

Estas 6 kandidatoj por 4 postenoj. La kandidatoj estas:

S-ro Radojica PETROVIĆ

S-ino Nina DANYLYUK

S-ino Xiaofeng GONG (Arko)

S-ino Marija JERKOVIĆ  
S-ino Elena NADIKOVA  
S-ro Ivan COLLING

BUTE legas la koncernajn sinprezentajn.

GROSJEAN: Colling estas tre serioza kaj lerta, li povus kontribui en ILEI bonege. Kun GONG la laboro estas tre agrabla, ŝi tre adekvate konsilis min.

PETROVIĆ: Oni ne scias, kiujn farenĵojn la kandidatoj pretas preni.

BUTE legas la agadkampojn de la kandidatoj kaj mencias iliajn preferojn.

MYNTTINEN: Ĉu estas problemoj kun homoj el Kroatio?

GROSJEAN klarigas, ke en Kroatio estas du sekcioj. PETROVIĆ aldonas, ke tiuj sekcioj vere neniam kunlaboris. La rezulto de la voĉdono estas:

COLLING atingas 34 voĉojn, PETROVIĆ 33, GONG 32, NADIKOVA 23, DANYLYUK 8, JERKOVIĆ 3.

En la nova estraro de ILEI estas:

S-ino Mireille GROSJEAN.

S-ro Emile MALANDA.

S-ro William HARRIS.

S-ro Ivan COLLING

S-ro Radojica PETROVIĆ

S-ino Xiaofeng GONG

S-ino Elena NADIKOVA

### **21.2 Elekto de kontrolo komisiono pri financoj**

BUTE klarigas pri la graveco de tiu komisiono. S-ro Chuck MAYS kaj S-ro Simon SMITS, membro de la Komitato, estas elektitaj kiel komisionanoj kun 33 voĉoj; ĉar unu komitatano ne ĉeestis, tio influas la nombron de la voĉdonrajtaj komitatanoj.

### **22.2 Adiaŭo al la eks-estraranoj**

GROSJEAN adiaŭas kaj dankas al s-ino Enikő Zengő SEREGHY, s-ro Bharat GHIMIRE kaj s-ino Zsófia KÓRÓDY pro ilia servo.

KÓRÓDY klarigas, kial ŝi ne rekandidatiĝis kaj mencias, ke ŝi restos laboranta en siaj kampoj.

GHIMIRE diras, ke li okupiĝos en Suda Azio kaj pri la tiea movado.

*25-minuta paŭzo ĝis la 16:00 horo*

## **22. Opinioj de komitatanoj pri gravaj taskoj kaj strategioj por la nova periodo**

Venas la sekvaj rekomendoj.

- Allogi junulojn al la Esperanto-komunumo kaj al ILEI.
- La landaj sekcioj apogu kaj subtenu la KER-ekzamenon.
- Paroli kaj diskuti kun ALTE pri la referenckadro adaptita por instruistoj.
- La ILEI-konferenco nomiĝu "Kongreso", sed tio devas esti trankvile pripensata.

- Ke la komitato tasku al la estraro evoluigi la penson pri la malfermo kaj kresko de Esperanto-kulturo. Oni devas lerni la kulturon ekde la unua leciono.
- Vidi la eblon okazigi festivalon. Okaze de tia evento estus pli da tempo, ĉar forfalus komitatkunsidoj.
- Fortigi la kontakton kun FIPLV (Federacio Internacia de la Profesoroj de Lingvoj Vivantaj)
- Trovi ligan al AEDE (Asocio Eŭropa de la Instruistoj)
- Kandidatiĝi en Unesko
- Vaste distribui la informilon “Kio estas ILEI”, kiu fakte estos en ĉiu kongresa sako en Lille okaze de UK.
- Prizorgi la budon en la UK kaj partopreni en la Tago de Lernado.

### **23. Prezento de provizora taskdivido**

Ĝi okazos vendrede dum la plenkunsido

### **24. Nova estraro al komitato: Decidoj kiel procedi, se ŝlosila ofico ne havos prizorganton.**

Oni elektu komisiiton.

### **25. Buĝeto**

HARRIS klarigas pri la enhavo de la buĝeto.

#### **25.01 Elspezoj**

Pri “ILEI: lerneja stipendio” demandas GLOSSOP; oni klarigas, ke tio estas instruado en aliaj partoj de la mondo kaj kontribuo al vojaĝkostoj de instruisto.

GROSJEAN: Ni provas subteni diversajn personojn en diversaj programoj, ekzemple en RITE kaj en la Interlingvistikaj Studoj en UAM Poznan.

KÓRÓDY: Estus bone testi tiujn, kiuj partoprenas la AMO-seminariojn.

TRIFOI: Membrokarto de ILEI devas esti konsiderata.

HARRIS: Eldonado de “Manlibro pri Instruado de Esperanto” devas esti konsiderata kiel investo pro la posta vendo kaj rehavo de la mono.

*Fermo de la dua sesio okazis je la 18:08 horo.*

### **3-a sesio: Mardo 20.07.2015, 9:00 – 10:30 horo.**

GROSJEAN informas, ke ŝi anoncis al la elektitoj kaj ne elektitoj la rezultojn de la pasinta elekto kaj venis diversaj gratuloj.

ARNAUD : Ni ŝatus disdoni flugfoliojn ĉe la konferenco de Unesko. Nova printado endas.

HARRIS: ni aldonos “preparlaboro en Afriko”.  
Oni diskutas pri la vizito de PETROVIĆ al Afriko kaze de konferenco tie.

GROSJEAN: ILEI subtenas la lernadon de Assane Faye, prezidanto de la Senegala Esperanto-Asocio.

Reprezentantoj ĉe Unesko eĉ ne ricevas repagon de la vojaĝkostoj.

## **25.02 Enspezoj**

En Afriko oni ne postulas ekzamenkotizon.

Dum la konferencoj en 2013 kaj 2014 estis gajno, kaj tre verŝajne ankaŭ en la konferenco de 2015.

## **25.03 Rezulto**

Estas defcito je € 5260, kiu kompare kun antaŭaj jaroj estas granda.

Se oni konsideras la eldonadon de la “Manlibro pri Instruado de Esperanto” la defcito malpliigās al € 4000 proksimume.

HARRIS: Estas diversaj bankokontoj, ĉefe en Svedio, el kiuj pluraj jam estas fermitaj.

TRIFOL: Kiu respondecas pri la fonduso Lins?

GROSJEAN respondas: La kasisto kaj la estraro.

MOERBEEK: En la banko ING oni povas kontroli la direkton de la mono, ILEI ne helpu la produktadon de armiloj.

GROSJEAN: Gravas anonci al la mondo, ke ILEI ne estas nur por Esperanto-instruistoj, ke oni povas subteni la instruadon de Esperanto membriĝante ĉe ILEI.

## **25.04 Akcepto de buĝeto**

GROSJEAN kontrolas la kvorumon, estas 27 voĉoj.

La buĝeto estas unuanime akceptita.

## **26. Ideoj kaj proponoj**

MOERBEEK: NGGE proponas, ke ĉe edukado.net aperu rubriko por listo de pintverkoj el diversa internacia literaturo, rilate al paco, medio kaj homaj rajtoj.

GROSJEAN respondas: Mi facile povas ankaŭ aldoni tiujn verkojn ĉe [www.noos.ch/ideo](http://www.noos.ch/ideo)

MOERBEEK: Ke estu ankaŭ ĉe edukado.net rubriko por ekzamenantoj, same ĉe ILEI, ke tie ili traktu gramatikon, kaj kiel tria propono, ke ni ne estu striktegaj je ekzamenoj.

## **27. Diversaĵoj**

MOERBEEK parolas pri sia kritiko kontraŭ la belgaj instancoj pri Petro Smedt.

KÓRÓDY kritikis al la gazeto “Heroldo” pri la artikolo pri ekzamenoj.

KÓRÓDY petas sendi homojn al instruista trejnado en Germanio.

KÓRÓDY prezentas KD-on kun kolekto de la Scienca Revuo en interkonsento kun ISAE.

KOVÁTS pri Eurotalk kaj la senpaga elŝut-periodo. ILEI devas diskonigi ĝin.

GROSJEAN: Ni devas sekvi la evoluon de la aplikaĵo Utalk.

**Fermo de la tria sesio okazis je la 10:30 horo**